

Joseph Mohr,  
Paca Nokt'!

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Joseph Mohr,  
Sankta nokto

*tradukita de Richard Schulz*

Pacplena nokt', dormas la mond'!  
Sankta nokt', ĉie en rond'!  
Viglas sole la tre kara par'.  
Ĉarma knabo kun bukla harar',  
Dormu en Dia ripozo,  
Dormu en Dia ripoz'!

Pacplena nokt'! Aŭdas paŝtist' ...  
Sankta nokt'! ... famon pri Krist'.  
De l' anĝel' haleluja la vok'  
Laute sonas tra ĉiu ajn lok':  
Venis por savi vin Kristo!  
Venis por savis vin Krist'!

Pacplena nokt'! Filo de Di'!  
Sankta nokt'! Jen la Mesi'!  
Amo ridas el via vizaĝ';  
Nia estas fervora omaĝ',  
Kristo, pro via naskiĝo,  
Kristo, pro via naskiĝ'.

*Traduko de la Germana poemo "Stille Nacht, heilige Nacht" de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-94-712 (2006-04-27 13:26:06)*

*Traduko de la Germana poemo "Stille Nacht, heilige Nacht" de JOSEPH MOHR (\*1792 – †1848) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1981-12.01.*

*Arg-94-1191 (2014-12-24 17:39:38)*

*Tiu ĉi traduko aperis 1981-12-01 en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis la tradukinto Richard Schulu (Rikardo Shulco). Tie estis indikita ankaŭ la melodio de tiu mondvaste konata germana kristnaska kanto. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*